ĈEA-retkomunikoj 2/2007

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio sendata al cxiuj rete atingeblaj membroj de CxEA sed ankaux al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ilin, suficxas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:
1. Gxenerala asembleo de UNO proklamas jaron 2008 Internacia Jaro de lingvoj
2. Lingva konsultejo de AdE
3. Esperanto en la Euxropa parlamento
4. Aperas la plej ampleksa nacilingva-Esperanta vortaro
5. EKOTUR 2007 tusxos kaj militistan terenon, kaj internacian filmfestivalon
6. Seminario pri laboro por Esperanto
7. Konferenco de CxEA en Polička
8. Kalendaro de E-Eventoj en Cxehxio
9. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (oficiala organo de CxEJ)

1. GxENERALA ASEMBLEO PROKLAMAS JARON 2008 INTERNACIA JARO DE LINGVOJ, kiel provo akceli unuecon en diverseco, tutmondan interkomprenon.

La Gxenerala Asembleo de Unuigxintaj nacioj, rekonante, ke vera plurlingvismo akcelas unuecon en diverseco kaj internacian interkomprenon, proklamis la jaron 2008 la Internacia Jaro de Lingvoj. Certe nova sxanco vidigi ankaux la problemojn de egalrajteca internacia komunikado kaj eblojn de
utiligo de neuxtrala internacia lingvo Esperanto. Bedauxrinde, vane oni sercxas en la reto la koncernan rezolucion en la cxehxa aux ecx nur la mencion pri gxia ekzisto. Tial kiel la unuan pasxon ni ne tuj emfazu Esperanton, sed ni informu pri la ekzisto de Internacia Jaro de la Lingvoj kaj pri la problemoj en komunikado, prefere provokante konstaton "ja ne estas alia solvo" kaj demandon "kaj cxu ekzistas alia solvo ol subigxi al la angla?". Cxar kiu demandas, tiu pli atenteme auxskultas ol se estas al li trudata iu informo. La kompleta koncerna rezolucio en la angla kaj en Esperanto troveblas en la blogo de Don Harlow (Usono):
http://www.harlows.org/don/opinions/archives/000469.php

2. LINGVA KONSULTEJO de AdE
La Akademio de Esperanto jxus reorganizis la Sekcion Konsultejo, kiun provizore, gxis la elekto de nova direktoro, prizorgas akademiano Boris Kolker.

Volante demandi vi prefere uzu la demando-formularon, kiun oni trovas en la retejo
http://akademio-de-esperanto.org/konsultejo/demandi.html aux sendu retmesagxon al "konsultejo@akademio-de-esperanto.org"

Klare formulu viajn demandojn, kaj demandu konkrete. La Sekcio Konsultejo petas, nepre ne sendi bagatelajn demandojn, kiujn povas respondi cxiu sperta esperantisto, sercxante en vortaroj kaj aliaj konsult-libroj. Por legi la

kompletan regularon de la konsultejo klaku al
http://akademio-de-esperanto.org/konsultejo

3. ESPERANTO EN LA EUxROPA PARLAMENTO:
Esperanto menciata en la Euxropa Parlamento, kaj aperanta en oficiala komuniko de tiu cxi organizajxo. Pro la Tago de Euxropo, dek tri nobelpremiitoj estis invititaj en la Parlamenton, inter ili ankaux Reinhard Selten. Li estis prezentita de la prezidanto de la Parlamento kiel esperantisto, kaj li mem aludis la lingvan problemon kaj Esperanton. Cxi tie vi povas legi mem en la cxehxa:
http://www.europarl.europa.eu/news/expert/infopress_page/011-6466-129-05-19-902-20070507IPR06397-09-05-2007-2007-true/default_cs.htm

4. APERAS LA PLEJ AMPLEKSA NACILINGVA-ESPERANTA VORTARO
Gxuste nun aperas cxe la renoma germana eldonejo Buske la Germana-Esperanta Vortaro de prof. Erich-Dieter Krause, 1678 pagxa, pli ol 160000 kapvortoj, la plej ampleksa nacilingva-esperanta vortaro gxis nun verkita. Gxia prezo estas 98 EUR kaj gxi estos unuafoje prezentita dum la kongreso de Germana Esperanto-Asocio en Hamburg cxi-vendrede, kiun partoprenos ankaux vicprezidanto de CxEA Petro Chrdle. Se iu deziras acxeti gxin kaj sxpari la internaciajn sendokostojn pli ol 300 Kč, eblas kontraux 2900 Kč, sed necesas TUJ (plej malfrue merkrede la 23-an) mendi gxin cxe chrdle@kava-pech.cz, kopion bv. sendi al info@kava-pech.cz (jam pluraj retmesagxoj senditaj al la unua retadreso bedauxrinde perdigxis pro nekonata kialo, do por certeco).

5. EKOTUR 2007 TUSxOS KAJ MILITISTAN TERENON, KAJ INTERNACIAN FILMFESTIVALON
Ekotur 2007, kiu estas cxiujara renkontigxo de tiuj, kiuj sxatas belan naturon kaj volonte ekkonas gxin turismante piede aux surbicikle, okazos cxijare ekde la 30-a de junio gxis la 7-a julio en Radošov super la rivero Ohře. Gxi situas tre proksime al la banloko Karlovy Vary, kie la saman semajnon okazos la fama internacia filmfestivalo, sed ankaux al la montaro Krušné hory (Ercmontaro) kaj militista ekzercregiono Doupovské vrchy. Ni jam havas
permeson viziti ankaux la liman parton de tiu belega regiono okupata de soldatoj, migros tra Krušné hory, sed ankaux unu tagon vizitos la festivalon Karlovy Vary. Pli da informoj vi trovos cxe http://www.kava-pech.cz/ekotur sed kaze de via intereso bv. unue informigxi rete cxe chrdle@kava-pech.cz pri la ebloj de tranoktoj, cxar tiuj indikitaj en la pagxaro jam restas nur tre malmultaj (tamen similaj en najbareco proksima).

6. SEMINARIO PRI LABORO POR ESPERANTO EN LANČOV
Inter la 5-a kaj la 11-a de auxgusto okazos en LANČOV (dua parto de la tria etapo) seminario „120 jaroj de Esperanto - kiel labori en la nuna mondo“, kiu klopodos informi kaj debati pri gravaj internaciaj projektoj (Socrates, Gutenberg,
Leonardo, Nitobe ktp.), pri konservado kaj prilaboro de nia kultura heredajxo
(niaj librokolektoj, manuskriptoj, arkivajxoj, nia movada historio, medalionoj de gravaj esperantistoj ktp.), pri prezento de Esperanto-kulturo al la publiko, apliko de Esperanto en turismo kaj pri kompletigado

de niaj vortaroj. La unusemajna arangxo kostas 1400 Kč (logxado kaj mangxo), aligxojn akceptas Věra Podhradská podhradska@volny.cz (post 26.6.2007 je telefono 736 249 264, cxar sxi jam estos en la tendaro sen aliro al la interreto).
Fine de la semajno okazos renkontigxo de la ekstendaranoj kaj solena vicigxo okazke de la jam 55-a tendaro.

7. KONFERENCO DE CxEA EN POLIČKA 2007-09-21/23
okazos en Tyl-domo, kies foto aperis en Starto 1/2007, p. 18. Je dispono estos du cxambroj kun paralelaj programoj, por kiuj vi povas aligxi kun via kontribuo je adreso
vanekmi@centrum.cz. Parto de la konferenca programo estos ankaux sxak-turniro.
Sabate posttagmeze oni povos viziti naskigxcxambron de la fama cxehxa komponisto Bohuslav Martinů en la pregxeja turo, lian muzeon kaj tombejon, kie trovigxas tombokelo de la geedzoj Martinů. Estas planataj ankaux ekskursetoj tra la urbo kaj al la riparitaj urbaj muregoj. La baza partopren-kotizo estas 450 Kč, por CxEA-membroj
350 Kč, por honoraj membroj, nevidantoj kaj gejunuloj gxis 30 jaroj 150 Kč. En la kotizo estas solena sabata vespero kun vespermangxo. La vendreda vespermangxo kaj sabata tagmangxo estas po 70 Kč, la sabata kaj dimancxa matenmangxoj po 40 Kč. La tranokto por unu persono kaj unu nokto estas 200 Kč en 3-lita cxambro, 250 Kč en 2-lita cxambro kaj 350 Kč en 1-lita cxambro (aligxilo estos en Starto 2/2007). Pago post 1.9.2007 estos je 100 Kč pli alta, pagoj surloke je 200Kč. Do pagu gxis 31.8.2007 je konto 195 230 825 / 0300 - variebla simbolo
estas xxxxx10012, kie CxEA-membroj anstataux xxxxx skribos numeron de sia legitimilo (vidu vian adreson sur Starto), ceteraj nulojn (ekz. F259 estos 0025910012). Cxiu cxehxa partoprenanto ricevos donace de la eldonejo KAVA-PECH libron de Roman Dobrzyński Zamenhofova ulice, kiu estas informricxa dialogo kun la nepo de nia majstro Ludoviko Lazaro Zamenhof , eksterlandaj partoprenantoj romanon de Vladimír Vinař La skandalo pro Jozefo. Pliaj informoj kaj aligxilo aperos en Starto kaj baldaux estos ankaux elsxuteblaj
cxe http://www.esperanto.cz

8. KALENDARO DE ESPERANTO-EVENTOJ EN CxEHxIO
cxifoje ni ne ripetas la kompletan kalendaron de Esperanto-arangxoj en Cxehxio, cxar ekde la dissendo de la lastaj CxEA-retkomunikoj okazis nenia kompletigo. Kiu do ne ankoraux planis sian Esperanto-libertempon, bv. reveni al la retkomunikoj 2007/1, kie vi certe trovos ion interesan por vi: cxu Turisma renkontigxo en Plasy, Esperanto-tendaro en Lančov, Internacia Paroliga Semajno en Dobřichovice, aux...

Sed denove alvoko: organizantoj de Esperanto-arangxoj en Cxehxio estas petataj sendadi
la informojn al chrdle@kava-pech.cz, ke la kalendaro estadu se eble kompleta. Ja ne eblas informi pri io, pri kio ni ne scias minimume la precizan daton, lokon, nomon de la arangxo kaj
retan kontaktadreson. Antauxdankon.

9. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(oficiala organo de CxEJ redaktata de Marek Blahuš)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) plu vigle partoprenas internacian Esperanto-agadon. Februare gxia praga klubo akceptis triopon el Varsovio. En Brno tiam dum 4 tagoj gastis juna esperantisto Nico HUURMAN el Nederlando, aprile alvenis por 1 tago svedo Johan KRIG ÖLUND kaj tuj poste Ben INDESTEGE el Belgio, kiu pasigis en Cxehxio 12 tagojn - ankaux en České Budějovice kaj Prago. Dufoje al Moravio alvenis Christian EPPLER el Vieno - ia. al Adonido en Vracov, kiun cxeestis rekorda nombro de 8 CxEJ-anoj. Samtempe Aleš TOMEČEK instruis cxe Sabla printempo en Písek. Paske Marek BLAHUŠ kaj Alla KUDRJASxOVA (rusino stagxanta en Zlín) cxeestis Internacian Junularan Festivalon en Italio. Al Alla, kiu mezmaje revenis moskven, CxEJ dankas pro sxia fruktodona unujara agado.

Marek BLAHUŠ gajnis de du usonaj bonfaraj fondajxoj monstipendiojn por universitataj studentoj, grandparte ankaux pro sia volontula agado en la Esperanto-movado. TEJO Tutmonde 2007:1 aperigis sub titolo "La pluvo en Hispanio" lian 4-pagxan artikolon pri decembra angla-hispana seminario. La revuo ankoraux rememorigas pri la pasinta novjara renkontigxo Ago-Semajno kaj la novembra trejnseminario de CxEJ kaj E@I en Brno.

Gxis 1.6. povas junuloj aligxi al Esperanto-vojagxo al Ukrainio. Komuna somera vojagxo el Cxehxio celas renkontigxon en Jalto kaj Kievon. Nove acxeteblas de CxEJ plenkolora posxeldono de la Manlibro pri Vikipedio. Aktualajxoj pri cxehxa junularo kaj raportoj pri ties arangxoj cxiam troveblas en gxia retpagxaro cxe http://cej.esperanto.cz/